

STARO

N-ro 3/2012 (244)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto: Petr Chrdle

Ĝenerala asembleo de OSIEK, inter alie ĝi traktis pri la OSIEK-premio kaj venontaj konferencoj

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK

en Esperanto-Muzeo Svitavy

14-20 Julio 2012

paĝoj 71 ĝis 73

Solena malfermo de la OSIEK-konferenco



Anne Jausions, David Šimek, Jana Pernicová



Podianoj



Anne Jausions interpretata de Pavla Dvořáková
inaŭguras la konferencon



David Šimek alparolas la konferencon en la
nomo de la urbo



Vladimír Dvořák alparolas la konferencianojn
kiel prezidanto de ĈEA



Blanka Čuhelová, direktorino de la urba muzeo

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marĉek: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj krom UEA, EEU)

Vicprezidantino (komitatano A de UEA): Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (UEA, EEU, membroj, sekcioj, kluboj, konferencoj, protokolado)

Vicprezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz (membrodatumbazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (informado, retaj projektoj, ekspozicioj, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

97-a UK de Esperanto

Hanojo 28.7. – 4.8.2012

La 125-an datrevenon de Esperanto UEA decidis festi en la ĉefurbo de Vjetnamio per ĉi-jara Universala Kongreso. Aliĝis 848 partoprenantoj el 62 landoj.

La kongreson inaŭguris prezidanto Probal Dasgupta per parolado, en kiu li laŭdis heroecon de la vjetnama popolo dum la milito en la 1960-aj jaroj. Post li parolis en la nomo de la komunista partio kaj vjetnama ŝtato la vicprezidantino de Vjetnamio Nguyễn Thị Doan, kiu substrekis, ke ilia respektata Onklo Ho (Ho Chi Minh) estis esperantisto. Plie ŝi transdonis al UEA Amikecan Medalon de la Socialisma Respubliko de Vjetnamio.

Poste sekvis kutimaj kongresaj programoj inkluzive de la merkreda ekskurso, aperis 6 numeroj de la kongresa kuriero, estis nomumitaj du novaj honoraj membroj de UEA, aljuĝitaj pluraj premioj kaj proklamitaj rezultoj de Belartaj Konkursoj. Fine estis akceptita kongresa rezolucio kaj la prezidanto Dasgupta per ferma parolado fermis la kongreson.

La kongreso kaj la paroladoj vekis ankaŭ emociojn kaj protestojn, precipe ĉe eŭropaj esperantistoj sekvantaj la kongreson ĉe la interreta paĝo de Libera Folio. Kelkaj riproĉis al UEA flatadon al la komunisma reĝimo, aliaj riproĉis al la estraranoj de UEA, ke ili volas nur eksponi sin mem anstataŭ zorgi pri la estonto de la movado (www.liberafolio.org/).

Por vjetnamaj esperantistoj ĝi certe estis esperigo, same gravis por ili la eblo komuniki kun homoj el okcidentaj landoj kun demokratiaj reĝimoj.

Novaj Honoraj Membroj de UEA



HORI Jasuo naskiĝis en 1941. Li diplomigis en la Ŝtata Universitato de Kioto en 1965, laboris kiel instruisto de la angla lingvo kaj emeritiĝis en 2005. Esperantisto ekde 1960, li estas membro de Japana Esperanto-Instituto kaj ekde 2005 ĝia vicprezidanto. Li estis ĉefredaktoro de la organo de JEI, *La Revuo Orienta*, de 1995 ĝis 2008, kaj li plu estas redakciano. De 2001 ĝis 2008 li estis prezidanto de la Komisiono pri la Azia Esperanto-Movado, kies bultenon *Esperanto en Azio* li redaktas ekde 2001. En LKK de la 92-a UK en Jokohamo (2007) li respondecis pri la gazetara servo. De 2007 ĝis 2010 li estis estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado. Ekde 1996 Hori estas loka delegito de UEA kaj fakdelegito pri edukado. Li multe vojaĝis en Azio por instrui Esperanton kaj helpi lokajn klubojn.

En 2011 Hori ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi pro la diskonigado de la japana kulturo per prelegoj, artikoloj kaj libroj, inter kiuj elstaras la libroserio Raportoj el Japanio, en kiu aperis jam 14 volumoj ekde 1997.

En 2004 li ricevis la Premion Ossaka de JEI. Li ankaŭ multe raportis en Interreto pri la vivo post la tertremo, cunamo kaj atomcentrала katastrofo en Japanio en marto 2011. Pri tiu temo li publikigis ankaŭ la libron *Tertrema katastrofo de Japanio 2011*. En 2009 kaj 2011 li ricevis la unuan premion en la literatura konkurso de JEI.

György (Georgo) NANOVFSZKY



naskiĝis en 1942 kaj lernis Esperanton en kursoj de Julio Baghy kaj Alfonz Pechan. Ekzameniĝis pri lingva kapableco en 1958. Ekde tiam li aktivas movade kaj publikigas verkojn, artikolojn kaj tradukojn.

Li estis prezidanto de Studenta E-Klubo en Budapeŝto 1958-1960 kaj kunorganizanto de la 51-a IFEF-kongreso en 1962 en Budapeŝto. De 1963 ĝis 1968 li aktivis en la Moskva E-klubo "Fajrero", vizitante la renaskiĝintajn klubojn en Siberio, Kaŭkazo, Leningrado kaj Irkutsk. Nanovfszky doktoriĝis pri ĝenerala lingvistiko en la Budapeŝta Universitato ELTE en 1973. Li estis funkciulo de UNCTAD en Ĝenevo 1982-85, ankaŭ reprezentante UEA ĉe UN en Ĝenevo. De 1983 ĝis 1988 li estis ĉefredaktoro de la revuo *Planlingvistiko*.

Kiel hungara ambasadoro en Moskvo 1992-98 Nanovfszky helpis reaktivigi la movadon en Moskvo kaj

tutlande. Li estis profesoro de la Moskva internacia universitato JUSTO 1994-2011. En 1996 li doktoriĝis pri politologio en la Rusia Akademio de Sciencoj. Membro kaj profesoro de AIS li estas ekde 1998. De 1998 ĝis 2006 li estis prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio kaj komitatano A ĉe UEA. Kiel ambasadoro en Singapuro 2002-2005 li aktivigis lokajn esperantistojn organizante regulajn renkontiĝojn. Ekde 2007 li estas honora prezidanto de HEA.

Gazetaraj komunikoj de UEA

Vjetnamaj distingo al UEA



La medalo kun akompana diplomo estos konservataj en la Centra Oficejo de UEA. Post la inaŭguro ok esperantistoj ricevis la medalon "Por paco kaj amikeco inter popoloj": Ivanka Stojanova Kirĉeva (Bulgario), Baldur Ragnarsson (Islando), Hori Jasuo (Japanio), Usuda Reiko (Japanio), Katalin Kováts (Nederlando), Saiki Akira (Japanio), Franciska Toubale (Aŭstralio) kaj Probal Dasgupta (Hinda Unio).

KONGRESA REZOLUCIO

125-jara, Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo

Kunvenante en Hanojo, Vjetnamio, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012, pli ol 800 partoprenantoj el 62 landoj en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto rekonfirmas la gravecon de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco, kaj reciproka respekto.

Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, Esperanto proponas praktikan kaj potencon rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo.

Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, Esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj.

Por internacia komunumo kiu klopodas realigi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn de Unuiĝintaj Nacioj, Esperanto proponas kompletigan evoluvojon al tutmonda partnereco, en kiu kunlaboras ne nur ŝtatoj kun ŝtatoj, sed homoj kun homoj.

125 jarojn post sia apero, Esperanto estas ĉiam pli vaste uzata kiel ponto al amikeco, paco, kaj disvolviĝo – evoluo akcelata per la disvastiĝo de alia tutmonda komunikilo, Interreto. Tion oni vidas interalie per la ĉi-jara aldono de Esperanto kiel 64a lingvo en la rettradukilo de Google.

Ni invitas homojn el ĉiuj landoj utiligi kaj kunkonstrui tiun ponton, cele al pli justa kaj paca mondo, kie disfloras ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

BELARTAJ KONKURSOJ 2012

POEZIO: 1-a premio: Aleksandro Mitin (Rusio) pro *Inspiro*; 2-a premio: ne aljuĝita; 3-a premio: Timothy Brian Carr (Britio) pro *La arto de la Poezio* kaj Luiza Carol (Israelo) pro *Kandanco*; Honora mencio: Aleksandro Mitin (Rusio) pro *Rivero Honto* kaj Jesper Jacobsen (Francio) pro *Homsaĝo*. Partoprenis 43 verkoj de 22 aŭtoroj el 14 landoj.

PROZO: 1-a premio: Sten Johansson (Svedio) pro *Tri legendoj*; 2-a premio: Ewa Grochowska (Francio) pro *Sabla reĝlando*; 3-a premio: Sten Johansson (Svedio) pro *Vasta domo*; Honora mencio: Lena Karpunina (Rusio) pro *La amnestipeto* kaj Jesper Jacobsen (Francio) pro *Subtenu min*. Partoprenis 21 verkoj de 15 aŭtoroj el 11 landoj.

ESEO: Premio "Luigi Minnaja": Sten Johansson (Svedio) pro *Ivan Ŝirjaev – la evoluo de verkisto* kaj Luiza Carol (Israelo) pro *La puzlo pri la elefanto*; 2-a premio: ne aljuĝita; 3-a premio: Aleksandro Melnikov (Rusio) pro *Leksikaj novismoj kaj neologismoj: anatemi aŭ odi?*; Honora mencio: Sten Johansson (Svedio) pro *Ĉu fundamenta evoluo aŭ neologisma glosolalio?* kaj Brandon Sowers (Usono) pro *Perspektivoj pri esperanta kinarto*. Partoprenis 12 verkoj de 8 aŭtoroj el 7 landoj.

TEATRAĴOJ: 1-a premio: Carmel Mallia (Malto) pro *Najbaroj*; Honora mencio: Adrienne Pásztor (Hungario) pro *Ombro en lumo* kaj José Eduardo Rosa Crispim (Portugalio) pro *Fetorafero*. Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

INFANLIBRO: Premio "Infanlibro de la Jaro": eldonejo PRO100 (Pollando) pro *Kato Koloro* de Moises Gutierrez Raimundez, tradukita de Przemysław Wierzbowski. Partoprenis 6 verkoj de 6 eldonejoj el 6 landoj

PREMIO "NOVA TALENTO": Jesper Jacobsen (Francio).

Premio de Fondaĵo Grabowski

estis aljuĝita al Gerrit Berveling pro 17 originalaj kaj 51 tradukitaj libroj kaj al aranĝo ARKONES en Poznano pro kultura programo (prelegoj, koncertoj, spektakloj, kursoj).

VJETNAMA KLASIKAĴO EN LA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO

En la 97-a UK en Hanojo okazis la publika lanĉo de la Esperanta traduko de *Rakonto pri Kjeŭ*, granda epika poemo de Nguyen Du (1766-1820), kiu aperis kiel numero 48 en la Serio Oriento-Okcidento de UEA.

Rakonto pri Kjeŭ estas konsiderata la plej grava verko de la vjetnama literaturo. En 3254 versoj ĝi rakontas pri la vivo de la bela kaj talenta junulino Thúy Kiêu.

La traduko de Le Cao Phan estis finpolurita de Baldur Ragnarsson, Renato Corsetti, Keyhan Sayadpour kaj Gerrit Berveling.

La bele bindita libro havas entute 248 paĝojn kaj aperis en 1000 ekzempleroj. Ĝia prezo ĉe la Libro-servo de UEA estas 18,00 eŭroj.

Gazetaraj komunikoj de UEA

Bengala premio por Dasgupta

Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA, estis premiita de la bengala literatura akademio Bangiya Sahitya Parishat, interalie pro siaj beletraj tradukoj el la bengala al Esperanto, ankaŭ pro tradukoj el Esperanto al la bengala kaj pro siaj lingvistikaj verkoj en la bengala, inter ili ankaŭ pri Esperanto.

laŭ Libera Folio

Pri homoj kaj verkoj

La nova libro de UEA (9 eŭroj) enhavas jenajn eseojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj: *Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo: la verkisto* (Eva Tófalvi), *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn: kelkaj pensoj pri la Esperanto-literaturo, ĝiaj legantoj kaj eldonejoj* (Lena Karpunina), *La Vojo* (Carmel Mallia), *Ĝoje sonu mia kanto: la vivo kaj verkoj de Marie Hankel* (Krys Ungar), *Kiel legi – ĉu legi – Stellan Engholm?* (Sten Johansson), *La du testamentoj de Sándor Szathmári* (Eva Tófalvi), *La lirika itinero de Miguel Fernández* (Gonçalo Neves), *Bohemia amoro: Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová* (Sten Johansson), *Arkaika parolado en Esperanto* (Alberto García Fumero), *La kvara periodo en Esperanta literaturo* (Jukka Pietiläinen), kaj *Pri la periodoj de la Esperanta literaturo* (Geoffrey Sutton). En la enkonduko, *Literaturo kaj interliteraturo*, Humphrey Tonkin resumas kaj komentas la unuopajn eseojn. En la postparolo Nicola Minnaja rakontas, kiel ekestis la ideo starigi la esean branĉon de la Belartaj Konkursoj memore al lia patro Luigi Minnaja.

Tri perdoj por nia kulturo

La 4-an de junio 2012 forpasis Raúl Juárez Sedeño (*1926), kuba esperantisto kaj tradukanto. La 26-an de junio mortis pola aktorino Jadwiga Gibczyńska (*1924) kaj la 15-an de aŭgusto finiĝis la vivo de mondfama verkisto kaj esperantisto Harry Harrison (*1925), kies romano *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato* estas senpage elŝutebla ĉe <http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php>.

Sciencfikcio kaj robotoj en Svitavy

De la 14-a ĝis la 20-a de julio 2012 okazis la 25-a Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy en la ĉambro de Esperanto-muzeo kiel la ĉefa konferencejo. Temo estis *Sciencfikcio kaj robotoj*.

La konferencon partoprenis sesdeko da personoj el 13 landoj. Paralele okazis konversacia kurso por komencintoj sub la gvido de Stano Marček kun 22 lernantoj el 5 landoj. Ĉiun antaŭtagmezon ili lernis, sed posttagmeze kaj vespere ili povis ĝui la komunan programon kun la konferencanoj.



Pavla Dvořáková kaj Miroslav Smyčka

La oficialan malfermon de la konferenco ĉeestis ankaŭ la urbestro de Svitavy David Šimek kaj ano de la regiona konsilio Jana Pernicová, kiuj transprenis la aŭspiciojn super la

konferenco. Miroslav Smyčka komence kantis la ĉefan himnon kaj gvidis la komunan kantadon de la Eŭropa kaj Esperanta himnoj, ĉiujn kompreneble en Esperanto.



István Nemere

Al la laŭtema programo „Sciencfikcio kaj robotoj“ kontribuis Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek, ES) per du prelegoj, Mikaelo Bronštejn (RU), Petro Chrdle, Mélanie Maradan (CH), István Nemere (HU) kaj Toon Witkam (NL) per du prelegoj. Kroma faka programero estis la seminario „Esperanto-bibliotekoj kaj arĥivoj“, gvidata de Detlev Blanke (DE) kun la dua ĉefa kontribuanto Miroslav Malovec. Per prelego pri la urbo Svitavy kaj ties regiono kontribuis la prezidantino de la loka klubo Libuše Dvořáková.



M. Adúriz prelegas pri la serio Sferoj

Oni ĝuis ankaŭ riĉan kulturalan programon, al kiu kontribuis Elena Puchova kun Dmitrij Dovĵik, Mikaelo Bronŝtejn, Pavla Dvořáková, Gerrit Berveling, Margit Turková kaj Miroslav Smyčka.



Elena Puchová kaj Dmitrij Dovĵik

Kulmino de la kultura programo estis prezento de la aparte prilaborita dramo de Karel Čapek R.U.R. (Rossumaj Universalaj Robotoj) kun la titolo „R.U.R. aŭ terura sonĝo“. Ĝi konsistis el la prezento de fragmentoj el la dramo de Čapek kunigitaj kun dialogo, en kiu la aŭtoro Karel Čapek (Jan Fidel Řepa) klarigas al sia amiko (Ján Bobrik) siajn zorgojn. La personojn en la fragmentoj de la dramo plenumis la membroj de la studenta teatra grupo DOMA (DOcela

MAlé divadlo), inter kiuj nur unu "roboto" estis esperantisto (Matěj Nárožný). Tamen, la prononco de ĉiuj rolantoj estis tre bona. Estis vera majstroverko de la reĝisorino Radka Oblouková kaj la ensemblo.



Ján Bobrik, Jan Řepa, Antonín Benc, Matěj Nárožný, Šárka Holasová

Menciindas ankaŭ tri interesaj posttagmezaj ekskursoj. Dum tiu al Litomiŝlo la prezidantino de OSIEK Anne Jausions metis nome de la partoprenantoj florbukedon sur la tombon de la Esperanto-verkisto Karolo Pič famiĝinta i.a. pro sia romano „La Litomiŝla Tombejo“. En la urbo Moravská Třebová la ekskursantoj vizitis egiptologian muzeon kaj urbodomon, kie ilin akceptis la vicurbestro, ankaŭ loka kastelo estis interesa.





El pluaj interesaj programeroj mi nomu la ekumenan Diservon en katolika preĝejo de sankta Egidio gvidatan de remonstranta pastoro Gerrit Berveling kaj nelaste la senvualigon de nova ZEO, nome la memortabulo omaĝe al la konferenco ĉe novplantita Esperanto-arbo (ĉeĥa nacia arbo tilio).



Anne Jausions kaj David Šimek

La ĝenerala asembleo de OSIEK voĉdonis i.a. pri seriozaj aferoj: La premio OSIEK por la jaro 2012, kiu estis elektita el la 5 kandidatigitaj nefikciaj verkoj de Mikaelo Bronštejn, Itván Ertl, Miroslav Malovec, Josip Pleadin kaj Sen Rodin, estis aljuĝita al István Ertl pro la traduko de „Sensorteca“ verkita de la hungara Nobel-premiito Imre Kertész (ĉeĥe ĝi aperis kiel „Člověk bez osudu“). Oni ankaŭ

por plua trijara periodo elektis novan prezidantinon, pli precize prezidantinojn, ĉar unu jaron, ĝis la venonta konferenco en Francio, plu plenumos la funkcion Anne Jausions (FR), kiu ĝin tie transdonos al la malnovnova prezidantino Mantha Christou (GR). Oni ankaŭ decidis pri la loko kaj temo de la konferenco en la jaro 2014: Ĝi okazos en Braşov, Rumanio, kun la temo „La maro en literaturo kaj muziko“.



La venonta IEK okazos en franca urbo Saint-Amand-Montrond de la 20-a ĝis la 26-a de julio 2013 kun la temo „Esperanta muziko“.

La aranĝon priskribis du numeroj de konferenca kuriero (red. M. Malovec) kaj ĉio estis filmita. Filmetoj estas jam troveblaj en interreto (youtube.com) sub la nomoj: *25a Internacia Esperanto-Konferenco*; *R.U.R. (Terura sonĝo) - Teatro*; *Alternativoj - Mikaelo Bronštejn*; *Ĝis - Elena Puchova kaj Dmitrij Dovžik*. Plie loka televido enretigis raporton sub la nomo *Mezinárodní konference o sci-fi a robotech v esperantu*. Sub tiuj titoloj ili estas simple troveblaj.

Teksto kaj fotoj: Petro Chrdle

ILEI-konferenco

20-26 julio 2012

En la urbo Kunmingo, sidejo de la provinco Junano en la suda Ĉinio, esperantistoj el 19 landoj kunvenis por diskuti pri Esperanto-instruado. Aliĝis 113 personoj, reale venis 105.

Ili aŭskultis multajn interesajn prelegojn, parte ĉinlingvajn kun interpretado: *Edukado en transkultura komunikado*, *Invito al la Tuta Vasta Mondo* (nova instru-plano), *Konfrontiĝi al problemo: studo de kulturaj diferencoj en la transkultura komunikado inter Ĉinio kaj la Okcidento*, *Kiel artistoj povas antaŭenigi pacan mondon*, *Yunnan bezonas Esperanton*, *Klasointerŝanĝoj: konatiĝ-strategio kun lingva, socia kaj kultura aspektoj*, *La akordo de la animoj kaj artoj*, *Lingvo kaj personeco*, *Scioj – Konsento – Rekono: Artaj Valoroj en la Transkultura Komunikado*, *La edukado pri valoroj en matematikaj kaj sciencaj klasĉambroj*.

REZOLUCIO

La 45-a Konferenco de ILEI, okazinta inter la 20-a kaj 26-a de julio 2012 en Kunmingo, Ĉinio, kun 113 aliĝintoj el 19 landoj:

- Deklaras sian entuziasman apogon al la nune diskutata Strategia Vizio de UEA; la Ligo kunlaboros en ĝia kompletigo en la formo de Strategia Plano.
- Apogas la vizian reliefigon de demokrata decidado en la Asocio, la klara elstarigo de ĉefaj agadkampoj kaj de la aktivigo de membroj kaj la landaj kaj fakaj asocioj.
- Subtenas la eneston de la grava

principo de lingva justeco, kaj proponas enkadrigi ĝin en la ideon de tutmonda solidara socio.

- Bonvenigas aparte la specifecon de la vizio, kiu antaŭvidas konkretajn subcelojn, kiuj estu realigeblaj, mezureblaj kaj ambiciaj.
- Kaj laŭdas forte la planojn dediĉi pli el la asociaj rimedoj al progreso en la kernaj agadkampoj, inter kiuj klare troviĝas la edukado kaj instruado.

Estraro de ILEI

Prezidanto:

s-ro Stefan MacGill, Hungario/Nov-Zelando

Sekretario:

s-ro Radojica Petrović, Serbio

Estrarano pri financoj:

s-ro Bill Harris, Usono

Pliaj estraranoj (taskdivido anoncota)

s-ino Gong Xiaofeng (Arko), Ĉinio

s-ro Bharat Ghimire, Nepalo

s-ino Magdalena Feifičova (Fejfi), Slovakio

s-ino Enikő Zengő Sereghy, Hungario

s-ino Penny Vos, Aŭstralio

s-ino Zsófia Kóródy, Germanio/Hungario

En Lingva Festivalo prezentiĝis 18 lingvoj. Estis elektita nova Estraro de ILEI, tri novaj aziaj sekcioj (Mongolio, Nepalo, Vjetnamio) kaj du novaj honoraj membroj de ILEI: s-ro Li Shijun (Laŭlum) kaj s-ro Li Weilun. Al diskutoj estis invititaj lokaj universitatoj, ĉar en la provinco vivas 25 minoritatoj, la lingva problemo estas tie tre aktuala.

Laŭ la revuo Esperanto

La 18-a IMEK sukcesis

La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso efektiviĝis en la tagoj 10. - 15. 7. 2012 en la iama centro de Ĉeĥa Silezio Opava, kie ĝi okazis jam la duan fojon. La antaŭa estis la 12-a IMEK en la jaro 1999. La ĉi-jaran renkontiĝon de medicinistoj okazigis UMEA, al kiu aliĝis Jagiellona Universitato kaj Farmakologia Instituto de Pola Akademio de Sciencoj en Krakovo kaj la Silezia Universitato en Opava, kies rektoro, prof. PhDr. R. Žáček transprenis honoran protektadon. Organizan flankon de la kongreso plenumis membroj de la loka Esperanto-Klubo, kiu aktivas en kadro de tradicia regiona societo Matice slezská. La klubon formas membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.



De maldekstre: Ing. V. Kočvara, urbestro prof. d. Z. Jirásek, prof. dr. A. Pilc el Krakovo, UMEA-sekretario doc. dr. W. Opka, UMEA-prezidanto dr. I. Ferenczy.

La ĉeftemo de la kongreso estis „Depresio – minaco de la 21-a jarcento“, tamen oni diskutis ankaŭ aliajn gravajn problemojn, inter kiuj menciindas rehabilitado kaj ĝia rolo en moderna medicino, rolo de vitaminoj kaj kemiaj

bioelementoj ĉe kuracado, flankaj efikoj de trouzado de medikamentoj ktp. La kongreson ĉeestis kvindekda fakuloj el sep landoj, la plej nombraj estis grupoj el Pollando kaj Hungario. Entute estis prezentitaj pli ol dudek fakaj kontribuajtoj en Esperanto kaj en la angla. Ĉiuj – sed ankaŭ kelkaj aliaj senditaj nur skriboforme – estas resumitaj en la 88-paĝa kongreslibro eldonita de la organiza komitato. En la fakan programon estis envicigita ankaŭ la komenca kurso de Yumeiho-masaĝo kaj sukcesaj frekventintoj ricevis koncernan diplomon.



Aŭskultantoj

La kongreson krom la ĝisnuna UMEA-prezidanto, d-ro Imre Ferenczy, inaŭguris la ĉefurbestro de Opava, prof. dr. Z. Jirásek, vicrektorino de Silezia Universitato en Opava dr. R. Dluhošová kaj kelkaj aliaj gastoj. Inter la partoprenantoj estis konataj personoj el la medicinista mondo, inter tiuj prof. dr. hab. n. med. Andrzej Pilc, prof. dr. hab. n. farm. G. Nowak el Pollando, doc. MUDr. ThDr. Mgr. Max Kašparů el Ĉeĥio, dr. M. Frankowska, prof. dr. W. Piekoszewski kaj vico da aliaj, kompreneble ankaŭ funkciuloj de UMEA, la ĝenerala sekretario doc. dr. W. Opoka, dr. Fr. Nitsche kaj MUDr. Eva Kopečná el Opava, kiu por la venontaj du jaroj provizore trans-

prenis rolon de UMEA-prezidantino pro rezignacio de ĝia ĝisnuna meritplena prezidanto dr. Ferenczy.


La tripersona organiza ĉelo de la 18-a IMEK – dr. E. Kopečná, Ing. V. Kočvara kaj Ing. J. Caletka – preparis por la kongresanoj tuttagan ekskurson al urbo Jeseník kun konata banloko Gräfenberg kaj viziton en la firmao TEVA, unu el la plej gravaj produktantoj de medikamentoj en Ĉeĥa Respubliko. Kulturan parton de la renkontiĝo plenumis G. Handzlik el Pollando kun S. Pilipovic el Serbio, distriĝi oni povis dum la konatiĝa kaj adiaŭa vesperoj, ambaŭ kun viva muziko. Agrabla surprizo – aŭ eble suveniĝo – por ĉiuj estis la speciala IMEK-biero, kiun la organizantoj sukcesis produktigi.

La 18-a IMEK ĉiuflanke sukcesis kaj aparte en faka medio – ne nur en Opava – ĝi kontribuis al prestiĝo de nia movado.

Kongresaj publikaĵoj

Dr. Max Kašparů preparis *Koncizan psiĥiatrian vortaron – Stručný psychiatrický slovník* spegule en Esperanto kaj en la ĉeĥa. Ĝi estas labormaterialo por bezono de la kongreso, kiu okupiĝis pri depresio. Miroslav Malovec, indikita kiel kunaŭtoro, kontrolis gramatikon de la difinoj kaj serĉis proponatajn terminojn en ekzistantaj vortaroj.

Ĉe la terminoj restis liaj notoj, kie la termino estis trovita, kio eble helpas al estontaj aŭtoroj de pli detala psiĥiatria terminara verko. La kajero enhavas ĉirkaŭ 500 terminojn sur 40 paĝoj.



Malnova prezidanto de UMEA dr. Imre Ferenczy kaj nova prezidantino dr. Eva Kopečná.

18th INTERNATIONAL MEDICAL ESPERANTO CONGRESS
18-a INTERNACIA MEDICINISTA ESPERANTO-KONGRESO

10-15.07.2012 en Opava – Ĉeĥio

KONGRESA LIBRO

„Depresio – minaco de la 21-a jarcento“
„Depression – threat of 21st century“
„Deprese – hrozba 21. stoleti“

IMEK KONFERENCJOJ KAJ KONGRESOJ

Jaro	Land	Land
1977	Krakovo	Pollando
1979	Hémešváradhely	Hungario
1981	Rato	Bulgario
1983	Papuca	Ĉeĥoslovakio
1985	Ŝiboverca	SRJ
1987	Krakovo	Pollando
1989	Katoviĉ	Belgio
1991	Kovno	Litovio
1993	Veszprem	Hungario
1995	Toronto	Ukrainio
1997	Krakovo	Pollando
1998	Opava	Ĉeĥio
2001	Oslo	Norvegio
2003	Oradea	Rumanio
2005	Prago	Ĉeĥio
2008	Krakovo	Pollando
2010	Hémešváradhely/Štepec	Hungario
2012	Opava	Ĉeĥio

Umea Esperanto-Asocio
Silezia Universitato en Opava kaj Societo Mátécsanak
Esperanto-Societo en Opava
Fakultato Universitato Medicina Silezia Universitato Paŝtoreja kaj Sankta
pri Psikiatrio de Pola Akademio de Sciencoj en Katowice, Silezia
Lega Esperanto-Societo
Dr. Eva Kopečná - Prezidanto, Václav Kačera kaj Ili Čadež - Viceprezidantoj
Eldevita de: Miroslav Malovec, 19-a str., Zdeněkova str. 12, 746 01 Opava, Ĉeĥio
ISBN 978-80-8881-111-1

Kovrilo de la kongresa libro

La kongresa libro estis verkita parte en Esperanto kaj parte en la angla. Ĝi enhavas salutvortojn de la ĉefurbestro d-ro Zdeněk Jirásek, de rektoro prof. d-ro Rudolf Žáček, de UMEA-prezidanto d-ro Imre Ferenczy, rememoron pri d-ro Josef Hradil, himnon La Espero, prelegon de Ing. Vlastimil Kočvara pri la Silezia Universitato kaj societo Maticesleziá, programon de la kongreso kaj tekstojn de kvindek da fakaj prelegoj (15 en Esperanto). Sume 88 paĝoj.

Vl. Kočvara, Opava
fotis Ivan Augustin
pri la publikaĵoj M. Malovec

La 68-a Internacia Junulara Kongreso

5-11 aŭgusto 2012 Hanojo

Sub la ĉeftemo: *Esperanto - Ponto de Amikeco, Frateco kaj Amo* okazis tuj post UK la kongreso de junularo. En la bunta programo estis prelegoj (ekz. pri Esperanto en Afriko), koncertoj per klasikaj vjetnamaj muzikiloj, teatraĵoj kaj ekskursoj, ekz. al maŭzoleo de Ho Chi Minh, al Literatura Templo, kiu funkciis kiel universitato pri Konfuceismo por nobeloj inter 1076 kaj 1779, al etnologia muzeo kaj al la vilaĝo S.O.S. por orfoj, al kiuj la kongreso donacis 350 eŭrojn kolektitajn en aŭkcio.

Ĵaŭde kaj vendrede okazis programo en montara regiono Ba Vi okcidente de Hanojo. Post varmiga danco oni disiĝis al kvar grupoj: ruĝa, roza, verda kaj blanka. Post invento de siaj nomoj kaj flagoj ili iris ludi en proksiman „ĝangalon“, fakte nacian parkon. Vendrede konkursis duopoj pri Perfekta Paro.

Kiel nova ĝenerala sekretario estis akceptita Paweł Fischer-Kotowski kaj kiel nova komitatano C Francesco Maurelli.

En rezolucio la kongreso deklaris: *En la junulara movado jam estas kutime labori kaj por evoluigo kaj fortigo de la Esperanto-komunumo kaj kulturo, samkiel por la disvastigo de la lingvo internacia, neŭtrale homa. Ni kredas ke la TEJO-agado povas esti pli komplete kaj amplekse difinita kiel raŭmisma finvenkismo.*

Laŭ la revuo Esperanto

Kiel disvastiĝas novaĵoj

Grava teoria studo

En la retejo de la eldonejo Sezonoj aperis jam kvara parto de studo de Dennis Keefe (Universitato de Nankino, Ĉinio) pri teorio de Everett Rogers (1931-2004), kiaj mekanismoj helpas aŭ malhelpas disvastigi novaĵojn, kaj kiel ni povus apliki ilin al Esperanto.

Unue ne estas vero, ke pli bona kvalito ĉiam venkas. Ofte malpli bonaj aferoj, sed pli bone reklamitaj kaj vidigitaj al la publiko, superatutis pli bonkvalitan rivalon. Kio vere efikas, decidas en multaj kazoj nur hazardo. Ekz. la tabakfirmao Marlboro eldonis skatoletojn kun fotoj de inĝeniero, laboristo, ŝipestro kaj vakero kaj ili mem estis surprizitaj, ke suverene plej vendataj estis tiuj kun vakero. Tial ili restis ĉe tiu varianto.

Laŭ Rogers eblas dividi la homojn en kvin grupojn: 1. *Novigantoj* (2,5%) volonte riskas novaĵojn kaj fariĝas iliaj pioniroj; 2. *Fruaj akceptantoj* (13,5%) aliĝas nur se ili vidas, ke aliaj jam utiligas la ideon. 3. *Frua plimulto* (34%) ne akceptas sanktan ideon, sed volas vidi praktikajn rezultojn, precipe komercan sukceson, senriskajn solvojn kaj profitojn. 4. *Malfrua plimulto* (34%) akceptas novaĵon, nur kiam ĝi vidas, ke la frua plimulto jam akiris grandajn profitojn kaj avantaĝojn. 5. *Postrestantoj* (16%) plej longe spitas kontraŭ la novaĵo kaj akceptas ĝin nur se ili estas devigitaj.

Estas profunda abismo inter idealistoj kaj praktikaj homoj. La unuaj pensas pri la **futuro**, la aliaj nur pri la **nuntempo**. Ilin ne interesas justeco, paco, amikeco, sed profito, ne en la futuro, sed tuj. Transsalti tiun abismon estas por ĉiu novaĵo la plej malfacila fazo.

-mm-

Ĝoja semajno en Nitra

Neniam mi partoprenis en Esperanto-studado, sed mi komencis lerni Esperanton la lastan jaron kun helpo de la interreto. Ĉi-jare mia deziro plenumiĝis.

Gelernantoj renkontiĝis ĉe la akceptejo de Universitata domo de Konstanteno Filozofa en Nitra – la antikva urbo en Slovakio, ĉirkaŭ 100 km norde de la ĉefurbo Bratislava. Tie estis 290 gelernantoj de 23 landoj.

Posttagmeze mi faris ekzamenojn – ĉu mi scias jam sufiĉe por meriti nivelon pli altan ol komencanto? Do ni havis entute 9 klasĉambrojn. Ni povis lerni gramatikon kun gelernantoj. La unuan tagon ni ludis por interkonatiĝi unu kun la alia. Posttagmeze ni vizitis la urbocentron, antikvajn monumentojn, kaj ni havis unikan ŝancon vidi enkriptigon de kanoniko Ladislav Kiška en la preĝejo de sankta Emeramo. Nia vizito finiĝis per teo-gustumado, post kio ni ankoraŭ vizitis judan preĝejon, troviĝanta kontraŭ la trinkejo.

Ĝi estis la sola libera posttagmezo, aliajn tagojn mi pasigis en la klasĉambro por ekkoni aliajn belajn vortojn de komuna lingvo. Vespere ni kantis, aŭskultis la ludon Historio de Universalaj Kongresoj – aktoroj Georgo Handzlík kaj Saša Pilipoviĉ – tre amuza. Alian vesperon JoMo kreis la frenezan atmosferon kun sia gitaro ktp.

Mia ĝoja semajno finiĝis. Ni ĉirkaŭbrakumis nian eminentan instruistaron

Dalia Pileckienė, kiu gvidis nin kun Johannes Mueller dum la lernado, kaj ni ekveturis hejmen.

Mi tre ĝojas, ke mi renkontiĝis kun multe da interesaj homoj kaj mi finfine bone esperantistiĝis. Mia unua komuna lernado okazis malproksime de mia loĝloko kaj estis plena de diversaj spertaj prezentadoj.

Ĝis revido venontan jaron en Martin, alia slovaka urbo! Dankon al ĉiuj, kiuj okupiĝis pri la brila organizado!

Jarka Malá

Elektronikaj libroj

Elektronikaj libroj en Esperanto estas publikigataj ĉefe de tri eldonejoj:

Sezonoj en Rusio:

<http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php>
proponas unu pagendan kaj 14 senpagajn librojn (elŝuteblajn al via komputilo)

Bitlibroj de Mondial en Usono:

<http://www.bitlibroj.com/>

proponas 24 aĉeteblajn verkojn, kiujn vi povas legi ankaŭ senpage sur la ekrano danke al Google-projekto, sed ne povas alŝuti al via komputilo (nur post pago)

Flandra Esperanto-Ligo:

<http://www.esperanto.be/fel/but/e-libro.php>

proponas ses provlibrojn senpage kaj 35 kontraŭ pago

Franko Luin, forpasinta en 2005, estis la unua eldonanto de senpagaj Esperantlingvaj elektronikaj libroj. Lia kolekto ĉiam estas je dispono:

<http://i-espero.info/elsutaro/esperantaj-libroj>

Tomáš Pumpr

(1906 - 1972)

Antaŭ 40 jaroj, la 10-an de septembro 1972, forpasis eminenta tradukanto de poezio kaj prozo Tomáš Pumpr, akademiano. Ni rememoru lian majstrecon per du malmulte konataj tradukoj, Milito kontraŭ Salamandroj de Karel Čapek kaj opero En la putro de Vilém Blodek laŭ libreto de Karel Sabina.

1. Sinjoro Povondra legas gazeton

Ekzistas homoj, kiuj kolektas poŝtmarkojn, kaj aliaj, kiuj kolektas tipografiajn originalojn. Sinjoro Povondra, la pordisto en la domo de G. H. Bondy, longe ne trovis la sencon de sia vivo; li dum longaj jaroj ŝanceliĝadis inter la intereso pri la pratempaj homoj, kaj inter la pasio pri la eksterlanda politiko, sed unu-vespere estis al li revelaciita, kio al li ĝis nun mankis, por ke lia vivo estu plena. La grandaj aferoj kutime venas neatendate.

Tiuvespere legis sinjoro Povondra gazeton, sinjorino Povondrová riparis al Franĉjo la ŝtrumpojn, kaj Franĉjo mienis, kvazaŭ li lernus la alfluojn de Danubo sur la maldekstra bordo. Regis agrabla silento.

„Tio min frenezigas,“ murmuris sinjoro Povondra.

„Kion vi havas,“ demandis sinjorino Povondrová, enigante fadenon en la kudrilon.

„Nu, pri tiuj Salamandroj,“ diris la patro Povondra. „Jen mi legas, ke en la pasinta jarkvarono oni vendis de ili sepdek milionojn da pecoj.“

„Estas multe, ĉu?“ diris sinjorino Povondrová.

„Tion mi pensas! Estas ja grandega cifero, panjo. Imagu, sepdek milionoj!“ Sinjoro Povondra skuis la kapon. „Ĉe tio

oni certe profitas fabelajn sumojn. - Kaj kiom da laboro oni nun perfaras,“ li suplementis post momenta rezonado. „Ĉi tie mi legas, kiel oni galope konstruas novajn terojn kaj insulojn. Mi diras, nun oni povas perkonstrui tiom da kontinentoj, kiom oni deziras. Estas granda afero, patrino. Mi diras al vi, tio estas pli granda progreso ol la malkovro de Ameriko.“ Sinjoro Povondra ekmeditis pri tio. „Nova epoko en la historio, ĉu vi komprenas? Kion fari, panjo, ni vivas en granda tempo.“

Ree ekregis longa hejmeca silento. Subite sinjoro Povondra pli intense ekfumegis el sia pipo. „Kaj se mi ekpensas, ke sen mi la afero ne estus okazinta!“

„Kiu afero?“

„Tiu salamandra merkato. Tiu Nova Epoko. Se oni tion precize konsideras, estis verdire mi, kiu tion kunaranĝis.“

Sinjorino Povondrová levis la okulojn desur la trua ŝtrumpo. „Mi petas vin, kiel?“

„Ĉar mi tiam lasis tiun kapitanon al sinjoro Bondy. Se mi ne estus lin anoncinta, tiu kapitano neniam en sia vivo estus renkontinta sinjoron Bondy. Sen mi, panjo, nenio estus el tiu afero. Nepre nenio.“

„Eble tiu kapitano estus trovinta iun alian,“ kontraŭdiris sinjorino Povondrová.

La piptubo de la patro Povondra malŝateme ekstertoris. „Vi tion komprenas! Tian aferon scias perfari sole G. H. Bondy. Karulineto, tiu vidas pli malproksimen, ol mi ne scias kiu. Aliuloj tion rigardus maksimume frenezaĵo aŭ blufado; sed sinjoro Bondy, tiu ne! Tiu havas flarsenton, mia kara!“

(T. Pumpr tradukis nur mezan parton de la romano, kompletan esperantigis J. Vondroušek)

En la puto

Veruno:

Aj, kia temp', malbona temp',
[: malbonajn sekvojn havas :]
kaj la senbrida junular'
[: neniam pekojn lavas :]
Foje min oni vokis nur:
[: Verunjo, la burgono :]
nun sorĉistino vokas min
tuta regiono, regiono.
Hodiaŭ en Johana nokt'
min ili ree petos
ke sorĉu mi.
Nu, kial ne?
Do, sortojn mi profetos.
Ah! Ve, kia temp'!
[: malbonajn sekvojn havas :]
Kaj la senbrida junular'
neniam pekojn lavas,
neniam pekojn lavas.

Veruno: Aj! Kial venas Lidunjo?

Lidunjo: Mi alvenas konsulti vin!

Veruno: Pri kio, diru do, knabin'?

Lidunjo:

Jen akceptu kelkajn ovojn
kaj freŝan bulon da buter'
kaj helpu min per sorĉo art'
en malfacila amafer'.

Veruno:

Halt! Ĉu vi diris, sorĉo art'?
Diabla profesio? Silentu!
Ne aŭdiĝu pen'
unu vort' pri magio!
Diabla help' ne estas ŝerc';
malbona estus ĝi komerc'

Lidunjo:

Aĥ, pardonu, mi ne pensas,
ke vi estas sorĉistin',
mi aŭdis nur kaj kredas,
ke konsilo via helpos min.

Veruno:

Ne, ne, ne, ne, Lidunjo,
ne, ne, ne, diablon for -

Lidunjo:

Sed ĉiuj diri povas,
ke kiu venas por konsil'
li certe helpon, helpon trovas.

Veruno:

Kaj tiu stulta babilaĉ'
pri sorĉa arto estis klaĉ'!

Lidunjo:

La stelojn vi komprenas,
saĝajn librojn vi tenas,
konas plantojn de l' natur'
ja eĉ kuron de l' futur'.
Tial mi tre fidas vin,
la fido gvidas min!
Juna kaj bela fraŭl'
amas min kaj mi lin.

Veruno:

Kredu, ke sen bedaŭr'
estos la aminklin'.

Lidunjo:

Kun li dezirus mi
geedziĝon festi.

Veruno:

Aj, tio dirus mi
povus bona esti.

Lidunjo:

Sed ankaŭ vidva vir'
ĝenas kaj volas min!

Veruno:

Tio ne estas mir',
ke li adoras vin.
Vi paŝos al ĉi fata magia put'
kun fido
kaj atente al profund'
rigardos la vido.
Kies iĝos vi edzin'
estonte laŭ destin',
ties vang' el klara put'
certe salutos vin.

elsendita 2.5.1949 de Verda Stacio

Vizito al Pollando

junio 2012-06-20

Grupon de infanoj ĉe la esperantista rondeto Amikeco pasintjare vizitis grupeto da amikoj, membroj de Verda Arbo el la pola Rybnik. Nun ni veturis reciproki la viziton.



El Česká Třebová ni ekveturis 15.6.2012 antaŭ la tagmezo kiel eta aro: nur Denisa, Nikola, eta Andrea kaj mi, Zdenka, ilia instruanto de Esperanto. Por subteni nian „eksterlandan“ programon ni kunprenis esperantistan hundeton KATYNKA. Ŝvitaj de varmego, ĉirkaŭ la kvina ni feliĉe atingis Rybnik-on, kie la amikoj disdividis nin por enloĝigi nin en siaj hejmoj.

Sabate la 16-an de junio atendis nin enorme interesa ekskurso. Partoprenis en ĝi infanoj, al kiuj Teresa jam la duan jaron instruas Esperanton, kaj kelkaj el iliaj gepatroj. Nome, temas pri integrita lernejo, kio signifas, ke ĝin vizitas infanoj sanaj kaj handikapitaj, kiuj gepatran helpon bezonis dum la ekskurso. Ni celis al vilaĝejo GÓRKI MALE (Montetoj Malgrandaj), en kiu troviĝas „viva muzeo“ de iama pola vilaĝa vivo. En la plej granda ĉambro de CHATA

CHLEBOWA (Pandometo) ĉiĉeronino rakontis al ni pri kulturado de greno, produktado de pano, butero, pri loĝado kaj higieno antaŭ pli ol 100 jaroj. Ŝi parolis pole, sed montris ĉion tiel demonstre, ke ni preskaŭ ĉion komprenis. Andrea eĉ prezentis knabinon, bananta sin en sidkuvo kaj lavanta siajn harojn.

En grenejo la infanoj povis konatiĝi kun laboroj, instrumentoj kaj maŝinoj uzataj ĉe semado kaj rikoltado de greno. Denisa provis draŝi per draŝilo kaj konstatis, ke la laboro ne estas tiel facila, kiel povus ŝajni.

Ni eniris ĉambron kun varmega bakforno. La infanoj rememoris fabelon, en kiu ŝorĉistino estis ŝovita en tian bakujon. Sed ni produktis el panpastro flanojn kaj bakis ilin. Bakitaj flanoj multe superas bakitajn sorĉistinojn. Ni frandis ilin kaj ricevis plie ankoraŭ freŝajn panon kaj buteron ĵus faritajn surloke. Eblis ilin plibongustigi per mielo aŭ porka graso. Fine ni tralavis la gorĝon per trinko de cikoria pseŭdokafo, frandaĵo de vilaĝanoj en la pasinteco.

Antaŭ la domo atendis nin abelbredisto por leciono nin pri la vivo de abeloj.



Poste ni iras al tendarfajro. La polaj infanoj kantas, rakontas, deklamas. La gepatroj entuziasme fotas. Post programo ni rostas kolbasojn por tagmanĝo. Fortigitaj ni enbusiĝas kaj veturas al PSZCZYNA, kie estas zoo kun uroj. Ĝi troviĝas en arbaro en la ĉirkaŭaĵo de kastelo. Danke al asfalta vojo eĉ rulseĝuloj povas ĝin atingi facile kaj agrable. Ankaŭ ĉi tie la infanoj ekkonas multe. Remburitajn bestojn, arbaristan domon, arbaron kun uroj, nordan pejzaĝon.



Preter paŝteja barilo ni iras ĝuste, kiam oni manĝigas la urojn kaj ura panjo naskas idon. Oni projekcias por ni filmon pri historio de uroj en Pszczyna kaj ni ekscias, ke la iama posedanto de la kastelo duko Jan Henryk XI Hochberg amis ĉasadon kaj invitis kronitajn kapojn el la tuta Eŭropo. Ĉasis ĉi tie ankaŭ rusa caro Aleksandro II kaj subskribis kontrakton pri interŝanĝo de bestoj. La caro sendis urajn masklon kaj tri femalojn kaj la duko sendis al li 20 pecojn de cervaj bestoj. Kiam ni revenas al la paŝtejo, la urido jam provas ekstari. Ni adiaŭas kaj revenas al Rybnik.

Teresa volis montri al ni kiom eble plej multe. Por la dimanĉa posttagmezo ŝi planis viziton de cisterciana klostro en

RUDIE sur rivereto RUDA. Antaŭ ne-longe la klostro estis ruino, nun danke al helpo de EU plejparto da konstruaĵoj estas jam riparita. Ni rigardas ekspozicion de ikonoj, pentraĵoj, diservaj vestoj, altaroj. Tamen la infanojn pli logas la naturo, manĝigado de anasoj, promeno tra arbaro. Proksime de la kastelo estas plantitaj kverkoj de la papoj Johano Paŭlo II kaj Benedikto XVI. Sed la infanojn pli logas ludejo, kiun Teresa klarvide lasis por la fino. De la parko apud la preĝejo venas melodioj de blovinstrumenta orkestro.

Lundo estas la lasta tago de nia restado. Ni venas en la lernejon vestitaj en T-ĉemizoj kun emblemo de Česká Třebová, al la lernejestrino ni transdonas donacojn. En neokupita ĉambro ni provas scenon pri viro en dezerto kaj pri ŝiprompuloj. Ni rigardas „muzeon de Silezio“ de Teresa, poste iras al ŝia klasĉambro, kie atendas aliaj spektantoj. Niaj knabinoj kun elano ludas ambaŭ scenojn kaj poste venas Katynka kun siaj ekzercoj. Aprezata estas ŝia kapablo redoni ludilojn sur destinitan lokon kaj danci. Ĉiuj volas ŝin karesi.



Post tagmanĝo kaj promeno tra la urbo ni forveturas. Al la knabinoj ŝajnis, ke la semajnfino estis tro mallonga.

Zdenka Novotná

Kaŝitaj trezoroj

Ne provizu al vi trezorojn sur la tero, kie tineo kaj rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj trafosas kaj ŝtelas; sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, kie nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek trafosas nek ŝtelas; ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.

Mat 6, 19-23



Kaŝitaj trezoroj estis temo de la 62-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kiu okazis ekde la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2012 en eklezia centro Hüttstadtmühle proksime germana urbeto Zöblitz. En la kongreso partoprenis pli ol 50 kredantaj esperantistoj el 11 eŭropaj landoj (AT, BG, CH, CZ, DE, EE, FR, HU, NL, RO, SE); Ĉeĥan Respublikon reprezentis Pavel Polnický, Václav Pospíšil, Petr Chrdle kaj Oldřich Arnošt Fischer. La kongreson organizis juna luterana pastoro Wolfram Rohloff, prezidanto de germana KELI. La partoprenantoj travivis kelkajn agrablajn tagojn en belega natura pejzaĝo firmigante sian volon vivi laŭ vortoj de Jesuo Kristo.

Oldřich Arnošt Fischer

Pri Esperanto en ĉeĥa enciklopedio

En la pasinta jaro aperis ĉe la scienca eldonejo Academia en Praha impona duvoluma verko „Průvodce kulturním děním a životním stylem v českých zemích 1948-1967“ (*Gvidlibro tra kultura agado kaj vivstilo en la ĉeĥaj landoj inter la jaroj 1948-1968*, prezo 850 Kč).

La libro ĉi-jare gajnis la literaturan prestiĝan premion *Magnesia litera* en la fako popularesciencaj libroj. Kun la ĉefaj kompilintoj doc. PhDr. J. Knapík kaj PhDr. M. Franc kunlaboris 23 fakuloj kaj 17 studentoj pri unuopaj fakoj.

Mi mem surbaze de la peto de J. Knapík preparis realaĵojn, kiuj rilatas al Esperanto, kaj prilaboris ilin kiel unuopajn artikolojn. Ili estas kapvorte menciitaj en la unua parto, kiu estas listo de organizoj, periodaĵoj, kongresoj kaj en tiu periodo uzataj mallongigoj – ekz. Esperantista, Zprávy ČSEV, VIII. Sjezd svazu esperantistů ktp.

Plua parto de la libro poste pli detale klarigas enhavojn de tiuj kapvortoj. La artikoloj priskribas la menciitan lastan kongreson de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en Brno (1950), Ĉeĥoslavakan Esperanto-komitaton, la gazeton Esperantista, Esperantajn presaĵojn, klubojn kaj rondetojn kaj aliajn fenomenojn, kiuj karakterizas nian movadon en difinita tempopoko.

Por ni estas tre utila, ke la informojn enhavas la libro premiita, do certe ankaŭ ofte uzota.

V. Kočvara

KOMENIUS - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan

1. VIVMISIO DE J. A. KOMENIUS

Johano Amos Komenius naskiĝis la 28-an de marto 1592 en la moravia urbeto Nivnice, ĉe urbo Uherský Brod, kiel filo de riĉa urbano Martin Komenský. Sed jam kiel 12-jarulo li perdis ambaŭ gepatrojn. Kiel orfo li vivis ĉe sia onklino, en proksima urbo Strážnice, kiu estis – pro militokazaĵoj – la 5.5.1605 elbruligita. Tial akceptis lin por edukado parencoj en Nivnice. Post morto de la gepatroj tio fariĝis plua, doloroplena travivaĵo en lia infanaĝo.

Post multaj malfacilaĵoj kaj obstakloj, li finstudis teologion kaj fariĝis – en 1618 – pastoro de la protestanta religia komunumo Frata Unuiĝo en la moravia urbo Fulnek. Sed komenciĝis la 30-jara milito kaj en la jaro 1621 tiu ĉi urbo estis forbruligita. Venkis la kontraŭreformacio kaj la 28.10.1621 estis proklamita ekzilio de la protestantaj pastoroj el la ĉeĥa kaj moravia landoj.

J. A. Komenius devis forlasi la urbon Fulnek kaj kaŝiĝis en la ĉeĥa urbo Brandýs nad Orlicí, kie en 1623 li skribis la fame konatan verkon **Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro**. En ĝi li karakterizas la mondon kiel labirinton, en kiu la pilgrimanto facile erarvojiĝas. Li ekkonas, ke ĉio estas vaneco, turmentado de animo kaj komencas malesperi... Sed subite li ekaŭdas internan voĉon, ke li revenu, de kie li ekiris: en paradizon de sia koro, kie parolos al li Dio – la Fonto de Harmonio.

En 1625 ekestis plua verko **Centro de sekureco** (*Centrum securitatis*), en kiu li pruvas, ke nur en Dio kapablas homo – en ĉiuj vivsituacioj – trovi ekvilibron kaj plenan feliĉon. Li komparas mondon al senfine granda, rotacianta rado, kies centro estas Dio. La decentriga forto kaŭzas, ke ĉiu aĵo, troviĝanta en la rado, estas puŝata al ĝia periferio. Tial ĝi ĉiam pli facile el la rado elfalas, ol alproksimiĝas al ties centro.

Konsekvence: ju pli malproksime estas homoj de la centro, des pli granda estas la konstanta ŝanĝado de la loko, vibrado kaj daŭra maltrankvilo. Male, ju pli proksime, des pli eta kaj trankvila estas la movo:

La mondo estas rado, kiu rotacias, ege vibras, bruas, forte sonas. Kiu en ĝian centron ne eksidos, implikiĝos kaj elfalos.

Tial necesas, ke **ĉiuj** homoj venku tiun ĉi decentrigan forton: strebu de la periferio de ĉiuj aĵoj atingi ilian centron – Dion. Tiamaniere estos atingota la ĝenerala sekureco.

En 1628 la situacio por Komenius ankoraŭ plimalboniĝis. Li ne plu povis kaŝiĝadi en sia patrujo kaj tial devis forlasi ĝin. Li foriris en la polan urbon Leszno, kie li fariĝis instruisto kaj pli poste direktoro de gimnazio de la religia komunumo la Frata Unuiĝo. En tiu ĉi latina lernejo estis instruata junularo pola, ĉeĥa kaj germana.

Ĉi tie, en 1628, li laboris je sia verko Didaktiko, t.e. arto de instruado. La libro aperis en pola kaj germana lingvoj, poste sekvis tradukoj en plurajn lingvojn. La aŭtoro per ĝi mondfamiĝis.

Laŭ tiu ĉi libro: *Homo estas la plej perfekta, plej kurioza, plej glora estaĵo, kies celo estas eterna kun Dio beateco... La junularo devas ellerni ĉion vivbezonatan, sed nenion superfluan... Pleje gravas: koni sin mem kaj ĉion (klereco), gvidi sin mem kaj ĉion (virto) kaj turni sin mem kaj ĉion al Fonto de kiu ĉio fluas – al Dio (pieco).*

En 1630 li finis verketon *Informaro de la patrinlernejo*, en kiu li i.a. skribas: *Ni ne rigardu infanojn, kiel ili aspektas nun, sed al kio ili estas destinitaj: fariĝi – post ni – Diaj estroj de la mondo. Ni komprenu kaj plenumadu niajn devojn rilate ili tiamaniere...*

Samjare li verkis libreton *Ekzercado en vera pieco* (Praxis pietatis). En ĝi li unuarange montras la perfektecon de Dio kaj kontraŭstaras la etecon kaj neperfektecon de homo. Li instruas, kiamaniere ĉerpi el la Dia Fonto la universalan harmonion...

En 1631 aperas lia verko *La pordo de lingvoj malfermita*, en kiu li prezentas instrukcion por lernado de fremdaj lingvoj. Tiu ĉi libro ebligis al li kontaktojn kun elstaraj reprezentantoj de tiam mondo de kleruloj. Li estis invitita al Londono, kie li loĝis en 1641-42.

Tie li – en 1642 – skribis verkon *Vojo de lumo* (Via lucis), dediĉitan al la *Reĝa Londona Socio*, sed prese aperinta nur en 1668. En ĝi li deduktas, ke la mondo estas lernejo de Dio, sed kulpe de homoj ĝi fariĝis ekzercejo de stulteco kaj furiozado. Tial la mondo droniĝas en malboneco: en ĉiuj sociaj klasoj kaj homaj statoj eĉ en ĉiuj nacioj daŭras senfinaj konfuzoj. La potenculoj kuracas homajn malakordojn per militoj... Sed la homa menso posedas naturdevenan amon al libereco kaj harmonio, kiun ne

eblas neniigi...

Plue li analizas, kial la ĝisnunaj solvadoj de la homaj aferoj ne sukcesis. Ĉar:

* je la ĝeneralaj malsanoj estis ordinare serĉataj kaj aplikataj nur partaj medikamentoj;

* oni uzas kuracilojn perfortajn, kontraŭstarantaj la homan naturecon;

* aŭ malfortajn, ne kondukantaj al likvido de la malsano.

El tio li – por plibonigo de la homaj aferoj – deduktas:

* se malsanas la tuta korpo de la homa socio, ne sufiĉas rebonigi nur iun ĝian parton...;

* ĉio, kion necesas savi en la inundo de homaj kaosoj, devas reveni al ordo, starigita de Dio. Alie ĉio dronos;

* ĉia medikamento por homaj aferoj devas esti ĝenerala, sed ne perforta. Per teroro nenio sukcesos... La universaleco devas esti modera kaj agrabla...

Por la ĝenerala transformo de la homaj animoj necesas iu komunuzebla, milda kaj efika kuracilo, simila lumon – sunon, antaŭ kies brilo kaj varmo nenio povas, eĉ ne volas kaŝiĝi... Tial necesas, ke la lumo de saĝeco estu kondukita al tia heleco, kiu sufiĉus lumigi **ĉiujn** homojn, forpeli el iliaj okuloj ĉiujn mallumojn de eraroj kaj malvualadi ĉiun bazan veron kaj bonecon de aferoj.

Tio ekestos, se ĉiujn aferojn kaj aĵojn – kiujn Dio malkovris al homoj – oni kompletigos unuece kaj ordigos tiamaniere, ke eblos prezenti ilin al **ĉiuj** homoj kaj ĉiu kapablos perfekte percepti, kompreni, akcepti, ja eĉ enamiĝi al ili.

(daŭrigota)

Renkontiĝo en Lipník nad Bečvou 16. 6. 2012

Anoj de Esperanta klubo en Přerov invitis esperantistojn por renkontiĝi en urbo Lipník nad Bečvou – urbo kun tradicio de metallaboroj. La inviton akceptis 25 personoj kaj la urbo bonvenigis nin en tute somera temperaturo.

Lipník nad Bečvou, fondita en la jaro 1294, situas en valo de Moravia pordego, tra kiu iam gvidis komerca sukcesa vojeto.

Sub la profesia gvidanto komenciĝis urba trarigardo. Unue, starante sur urboplaco de T. G. Masaryk, ni vidis plastikon de fera tilio, farita de Alfred Habermann. Plue barokan fontanon kaj pestkolonon konsekritan al Virgulino Maria, burĝajn domojn kun arkadaro.

Historian renesancan sonorilejon el la 16-a jc. ni trarigardis de sube ĝis supren. Surprizis nin grandaj sonoriloj, ilia historio kaj funkcia, moderna sonorado.

Dumvoje ni ĉirkaŭiris la preĝejon de Jakobo la Granda kaj la lokon de iama ekzekutista domo. Interesis nin fera plastiko „Malfermita pordego“, kreita antaŭ akcepto de la urbo Lipník nad Bečvou inter eŭropaj forĝistaj urboj. Plaĉis al ni restantaj fortikaĵoj kun bastiono, juda tombejo kaj Sinagogo. Ĝi estis prilaborita en la 19-a jc. por grupo de ĉeĥoslovaka eklezio.

Ĉirkaŭ Piarista klostro kun studenthejmo el la 17-a jc. kun apuda preĝejo de Francisko el Asizo (František Serafínský) ni atingis renesancan kastelon. Ĝi estas ĉirkaŭigita per bela parko en angla stilo.

Ni admiris larĝecon de tre elkreskinta fago arbara kun multaj superpendantaj

branĉoj.

Tie ni kaptis iom da postulata ombro.

Sur tegmenta florteraso aranĝita laŭ origina plano super iamaj kastelaj ĉevalstaloj ni rigardis ĉirkaŭaĵon, faris multajn fotojn kaj ricevis belaspektajn memorkartojn pri tiu ĉi renkontiĝo.

Antaŭ ricevo de tagmanĝo estis prezentitaj informoj de anoj el diversaj rondetoj.

Dankon al klubanoj por interese aranĝita kaj travivita tago!



Kompilis: J.Křížková

Komuna aŭtuna feriado por infanoj, familioj, geavoj



Kursoj, koncertoj, muzikado, manĉo, promenado, ludoj, kaj aliaj aktivaĵoj laŭ via elekto. Specialaj gastoj: Svetlana Smetanina el Moskvo kaj Kees Ruig el Nederlando. En la **kastelo Greziljono (27.10.-3.11.2012)**. Detalaj informoj:

www.gresillon.org/autune.

Kontakto: kastelo@gresillon.org,
tel. 0033-2.41.89.10.34. Adreso: Maison
Culturelle de l'Espéranto, Grésillon,
F-49150 St. Martin d'Arcé

60 jaroj de SET Lančov

En la printempa jarkunveno de EK Třebíč estis elektitaj en la komitaton junaj membroj, kiuj gvidas junularan grupon zorgantan nun pri la tendaro en Lančov. La ĉi-jaraj tri etapoj jam okazis sub ilia reĝisorado kun helpo de Věra Podhradská. Antaŭ la tendaro ili dum brigadoj blankigis kaj riparitis ĉiujn kabanon kaj la manĝejon, kreis tute novan modernan aspekton de la tendara retejo www.set-lancov.cz.

En la tri etapoj sume partoprenis pli ol 80 infanoj kaj gejunuloj, precipe en la kursoj de la angla, nur 5 el ili en du etapoj lernis en Esperanto-kurso. Ĉiuj kursanoj sukcese pasigis ekzamenojn kaj ricevis diplomojn. Krom instruado estis por ili preparata programo, ekskursoj, ludoj, naĝado ktp.

La du najbaraj tendaroj (Svitavy kaj Znojmo) nuligis la trian etapon pro manko de infanoj, nia tria etapo estis male la plej forta.



foto Petr Doležal

Post la tria etapo okazis jam la 15-a renkontiĝo de iamaj tendaranoj kun trideko da partoprenantoj. Dum la sabata solena viciĝo Pavel Sittauer

rakontis la historion de la tendaro, prezentis s-rojn Jaro Habeš kaj František Sklenář kaj sian edzinon, Olga Sittauerová (tiam ankoraŭ fraŭlino Hruběšová), ĉar ili kvar en 1950 komencis organizi tendarojn. Ĉeestis ankaŭ akademia pentristo Josef Kremláček, kiu antaŭ 60 jaroj ankoraŭ kiel knabo pentris tendaran totemon kaj sur tendo grandan kapon de indiano, kiu ege „plaĉis“ al la ŝtata polico.



Fine li esprimis esperon, ke la junaj gvidantoj daŭrigos la laboron pluajn 60 jarojn. La partoprenantoj de la renkonto esprimis al la gejunuloj, kiuj transprenis la imaginaran stafeton, plenan subtenon kun deziro, ke la tendaro plu prosperu kaj estu alloga.

Posttagmeze la partoprenantoj vizitis la elektrocentrejon en Vranov, kie juna ĉiĉerono montris al ili Francis-turbinojn kaj aliajn ekipaĵojn. Dek-minuta instrua filmo klarigis historion de la digolago kaj de la elektrejo.

Vespere ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ tendarfajro por komune kanti ĉe gitaro kantojn Esperante kaj ĉeĉe kaj gustumi vinon kun manĝetoj.

M. Malovec, V. Podhradská

Miroslav Hlaváč

(1933-2011)



Fama figuro de SET Lančov, nomata „Pampeliška, Pampelda“ forpasis jam la 3-an de novembro 2011, sed lia nevo sciigis nin nur en somero 2012, kiam la familio rememoris lian neĝisvivitan naskiĝtagon (la 21-an de aŭgusto).

Dum laborgrigadoj en la tendaro li estis konata kiel vera labormaŝino kaj vespere ĉe tendarfajro li amuzis infanojn en rolo de barbohava reĝidino Pampeliška (Leontodo), de kio devenas lia ŝercnomo. Kiel arbarista inĝeniero li ofte pasigis tempon en arbaro, kio iomete sovaĝigis lin, sed ankaŭ donis sciojn pri la naturo. Li aspektis kvazaŭ senhejmulo, ĉar li malmulte zorgis pri sia ekstera aspekto, kredante, ke nur karaktero gravas.



Sur la foto el 1961 ni vidas lin dum laborbrigado en Lančov

Ankoraŭ kiel pensiulo li studis en pedagogia universitato kaj sukcese diplomigis, pri kio raportis eĉ ĵurnaloj, ĉar li estis la plej aĝa studento de la taga studado (ne telestudado).



Li provis ankaŭ verki, ekz. odon je Lančov aŭ drameton *Hontema arbaristo*, en kiu li eble malkaŝis sian propran vivtraŭmaton (Startoj 2/2002 kaj 1/2003). Ni adiaŭu lin per liaj versoj pri Lančov.

LET Lančov

V údolí té naší zátoky
malebný koutek my známe,
v táboře s mladými přáteli,
každý rok setkání máme.

Do údolí s loučkou
se každý rok vracíme,
tebe koutku vlasti
[: má z nás každý tak rád :]

SET Lančov

Rande de nia rivera val'
grundon pentrindan ni konas,
ĉiusomere en la tendar'
ĝojan renkonton ĝi donas.

En herbejan valon
ni ŝatas revenadi,
vi patruja grundo,
[: estas nia amo :]

Miroslav Malovec

Forumo en Ĉinio

En la ĉina urbo Xi'an (Ŝiano, Si-an) kun ok milionoj da loĝantoj, proksime al la elfosita terakota armeo, la Xi'an-a Esperanto-Asocio okazigos inter la 28-a de septembro kaj la 1-a de oktobro 2012 la unuan forumon por disvolviĝo de Esperanto. La forumo traktos uzon de Esperanto kiel ponton inter la eŭropaj kaj ekstereŭropaj lingvoj en komerco, turismo kaj aliaj aplikoj, perspektivojn de Esperanto-kursoj ĉe universitatoj. La partoprenantoj gastos en Nanyang Hotelo de Xi'an Jiaotong Universitato. Pliajn detalojn petu ĉe stalinoyuan@gmail.com.

Flugfolio Mladá Boleslav



Esperantistoj en Mladá Boleslav preparis dulingvan flugfolion pri *Metala vojo* en ilia urbo, 4-kilometra instrua vojo por turistoj kun 12 haltoj kaj informpaneloj: Muzeo Škoda Auto, Parko Výstaviště, Industria lernejo, Placo de Ĉeĥaj fratoj, Karmel, Placo Komenského, Malnov-urba placo, Placo Templ, Burgo, Juda tombejo, Vintra stadiono, Preĝejo. Ĝi prezentas la historion de la urbo, kie prilaborado de metaloj ĉiam gravis.

Centjara parolistino rememoris Esperanton

La 7-an de julio 2012 mi aŭdis post-premieron de radioprogramo „Arĝenta vento“ („*Stříbrný vítr*“) de la 14-a de januaro 2012 (stacio ĈRo 2 – Prago Du). Gastino de redaktoro *Jaromír Ostrý* estis 100-jara *Marie Coufalová Kaukušová*, eksa radioparolistino de Ĉeĥoslovaka Radiostacio en *Brno*, naskiĝinta la 21-an de novembro 1911 en *Třebíč-Borovina*. Ŝi komencis labori en la radiostacio en la jaro 1936, sed post tri jaroj ŝi devis forlasi sian laborlokon en *Brno* kaj laboris kiel helpanta radioparolistino en Prago. Post la dua mondmilito ŝi denove eklaboris en *Brno*, kie ŝi restis ĝis la jaro 1948. *Marie Coufalová Kaukušová* nuntempe loĝas en maljunulhejmo en *Náměšť nad Oslavou*.

Dum la intervjuo *Marie Coufalová Kaukušová* menciis Esperantan radio-disaŭdigon de la radiostacio de Brno. Ŝi diris, ke la fama aktoro *Karel Höger* tie parolis uzante Esperanton. Ŝi mem scias, ke „*děkuji*“ estas „dankon“ esperantlingve. Kvankam ŝi ne nomis rekte esperantistan Verdan Stacion (1932-1937), ŝia rememoro estas valora ŝtoneto por mozaiko de esperantista historio.

Oldřich Arnošt Fischer

Konkurso pri kurttfilmoj

Germana Esperanto-Asocio okazigas konkurson de 5-minutaj filmoj omaĝe al 125 jaroj de Esperanto. Por premioj estas je dispono sume 5 mil eŭroj. Necesas konsento de filmitaj personoj kaj de uzita muziko. Kondiĉojn vi trovos ĉe:

<http://esperanto.de/gea/film-eo.html>

Skribu al: kurzfilmwettbewerb@esperanto.de

Omaĝo al pioniroj

Nurenbergo 17-20.5.2013

Tuj post la ĉi-jara datreveno de nia lingvo jam okazos plia jubileo: en Nurenbergo **la unua Esperanto-Grupo de la mondo** festos sian 125-jariĝon.



La kastelo de Nurenbergo

Dum vendredo okazos akcepto en la urbodomo, poste ni festos per diversaj programeroj solenaj kaj amuzaj. Kiel speciala gasto venos prof. Humphrey Tonkin el Usono, plia festpreleganto estos prof. Martin Haase. Vespere komenciĝos la 90a Germana Esperanto-Kongreso kun la temo „Pioniroj kaj vizitoj“, kiu aperados en prelegoj, ekskursoj kaj teatraĵo. Krome nuntempaj pioniroj prezentos siajn agadojn - ĉu eble akaŭ vi? Dum la ekumena diservo ludos unu el la plej bonaj Nurenbergaj trombon-orkestroj.

Dimanĉon vi povos elekti inter multaj gvidataj ekskursoj aŭ malkovri la vizitindan urbon memstare. La kongresejo, kie ankaŭ eblas tranokti, situas konvene en la malnova urbocentro tre proksime de la ĉefa stacidomo.

Pli da informoj kaj aliĝilo troveblaj ĉe www.esperanto-nuernberg.de/gek aŭ Esperanto Nürnberg, Moritzbergstr. 37, 90482 Nürnberg, Germanio.

La nurenbergan grupon fondis Leopold Einstein unue kiel volapukistan jam en 1885 kaj fariĝis ĝia prezidanto. Sed kiam

li ricevis la Unuan Libron de Zamenhof en 1888, li konvertiĝis tuj al Esperanto kaj en decembro samjare ankaŭ la tuta grupo. Lia plej fama verko estas germanlingva broŝuro „La lingvo internacia kiel plej bona solvo de la internacilingva problemo“. (De tempo al tempo oni erare mencias tiun frazon kiel citaĵon el la pensoj de Albert Einstein.)

Pro lia grava malsaniĝo en 1888 transprenis prezidantecon Christian Schmidt, kiu komencis eldoni la unuan gazeton *La Esperantisto* kunlabore kun Zamenhof. Post la voĉdonado pri reformoj en 1894 la klubo forlasis Esperanton kaj en 1901 aliĝis al Idiom Neutral, reformita volapuko, kiu jam tre similis al Esperanto, kiel atestas la nomo de la klubo: „Klub de amiki de lingu universala“.

En 1892 transprenis redaktadon de *La Esperantisto* W. H. Trompeter, kiu fondis grupon en Schalke. La eldonadon haltigis en 1895 la rusa cenzuro, kiu ne enlasis plu la gazeton en Rusujon, ĉar tie aperis artikolo de Tolstoj *Prudento aŭ Kredo?* Malgraŭ ĉio ĉi la eldonitaj 746 paĝoj inter la jaroj 1889-1895 fariĝis elstara klasikaĵo de nia literaturo (reeldonita libroforme en 1988 de R. Hauptenthal).



Leopold Einstein (1834-1890) kun „La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems“ kaj provnumero de la unua gazeto „La Esperantisto“ kun ĝia dua redaktanto W. H. Trompeter (1839-1901)

laŭ Vikipedio

KALENDARO 2012

2012-10-03 Ĉeĥa-Saksa Tago en Bad Schandau, Info: NoKoSaksio@gmail.com

2012-10-08-14 Aŭtuna lingva seminario en Skokovy, Info: drahotova@esperanto.cz

2012-11-08-11 La 1-a Internacia Esperanto-lernejo en Bartošovice, verdastacio@gmail.com
<http://pably0.wix.com/lernejo>

2012-12-08 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek, Info: pisek@esperanto.cz

2012-12-09 Marcipana Kristnaska dimanĉo
Info: dvor.libuse@seznam.cz

Migra ekspozicio "Ĉu esperanto estas morta lingvo?"

oktobro Kastela grenejo en Žirovnice,

novembro Urba biblioteko en Dačice

decembro Filozofia fakultato MU Brno

BOHUSLAVA PELCLOVÁ jubileas



En novembro 2012 la honora membrino de ĈEA festos sian vivjubileon. Bohuslava Pelclová (1922) esperantistiĝis kiel emeritino, kiam ŝi aŭdis pri Esperanto en radio. Ŝi aliĝis al koresponda kurso, partoprenis diversajn kursojn kun ekzamenoj, ankaŭ en Slovakio, kaj en Bulgario ŝi ricevis diplomon pri finstudo. Ŝi vivas en Šternberk, sed aktivas en EK Olomouc. Ŝi instruis Esperanton en la klubo kaj ankaŭ en religia lernejo Catiras. Ofte ŝi partoprenis diversajn aranĝojn kaj kongresojn kiel oferema akompanantino de nevidanta amikino Danuše Vokáčová. Esperanto donis al ŝi multon, precipe bonegan aktivecon en emerita aĝo.

VLADIMÍR MOHAPL

(1919-2012)



La 6-an de aŭgusto 2012 forpasis honora membro de ĈEA kaj de Esperanto-klubo en Olomouc d-ro Vladimír Mohapl. Li naskiĝis la 8-an de aŭgusto 1919, la studadon de juro li komencis antaŭ la dua mondmilito, sed post fermo de la ĉeĥaj altlernejoj fare de la okupaciantoj, li devis rompi la studadon kaj fini ĝin nur post la milito.

Esperanton li lernis jam en 1936 kiel lernanto de Henrik Seppik. Li fariĝis membro de studenta esperantista grupo ĉe studenthejmo en Olomouc. Post la milito li denove aktivis en Esperantujo. La unua postmilita kunveno (19.9.1946) lin elektis kiel prezidanton de la klubo en Olomouc. Tiun funkcion li plenumis ĝis 1973 kaj poste denove post 1983 kiel pensiulo. Li laboris ankaŭ kiel regiona komisiito, redaktoro de Informilo Olomouc, organizis dekon da regionaj kunvenoj kun prelega programo. Kiam en 1952 la esperantista organizo en Ĉeĥoslovakio estis likvidita, d-ro Mohapl sukcesis envicigi la esperantistan rondeton sub la aŭspicion de Kultura Societo de Nacia Komitato, kie la klubo funkciis ĝis 1990. Por 20/21-a de oktobro 1956 li aranĝis tutlandan kongreson, kiu celis refondi la asocion, sed la ŝtata polico en lasta momento ĝin malpermesis. Post revivigo de la organizita movado en 1969 li fariĝis membro de revizia kaj kontrola komisiono de ĈEA. La historion de la klubo li priskribis en kajero *90 jaroj de la Esperanto-movado en Olomouc* (2001).

Jak platit svazu

Pozor, změna účtu!

Nyní Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES

06941 členství UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky

06944 poplatek UK

06945 kongres EEU

50400 komise pedagogická ILEI

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50404 Paroliga kurso

50405 svazové zkoušky

50800 sekce nevidomých LIBE

50900 sekce zdravotníků UMEA

51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300

51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010

51200 sekce informatiky

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, polnicky@quick.cz. Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč

La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

Juna Amiko: 280,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1130,- Kč (*750,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Femina: 750,- Kč (*500,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Heroldo de Esperanto vychází, ale s potížemi

V letošním roce vyšla jen dvě čísla, totiž č. 2 (celkově 2184) s označením *ĝis februaro* a číslo 5 (2188) s označením *ĝis majo*. Chybí vysvětlení, kam se poděla ostatní čísla, s jakými potížemi vydavatel zápasí a jak vidí budoucnost časopisu. Dokud se tyto věci nevyjasní, stahujeme HdE ze seznamu předplatného.

KAEST 2012

15-18 novembro 2012

<http://kaest.ikso.net/>

"Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko"

La aranĝon gastigos malgranda slovaka urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava kaj 90 km de Vieno.

Ĉeftemo de KAEST 2012: „Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj“

La programo konsistos el kelkaj partoj:

- prelegoj (en du paralelaj blokoj – ĉeftemaj kaj alitemaj)
- trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj ks.)
- fakaj diskutoj (pri certa temo)
- vespera (neformala) programo (vingustumado, filmo-prezento, diskutoj, ks.)
- eblaj ekskursoj (laŭ interkonsento kaj mendoj)

E@I-teamo invitas vin ĉiujn aliĝi kaj prelegi aŭ simple ĉeesti en **KAEST 2012. Por ke la faka vivo en Esperanto evoluu!**

Adreso:

Ŝtudijne stredisko ÚJOP ČDV UK Modra-Harmónia
Modra-Harmónia č. 3553
SK-900 01 Modra, Slovakio
www.modra.cdvuk.sk; www.cdvuk.sk

Sanakvo

Pura akvo akirita de aero? Humideco de aero estas tre promesplena fonto de pura kaj trinkebla akvo: grandegaj kvantoj de akvo estas en aero en formo de akvovaporo. Eĉ en ekstreme sekaj lokoj, kiel ekzemple en dezerto Saharo, ĉiu kuba kilometro de aero entenas 3 000 000 da litroj de akvo, kio estas ekvivalento de rivero 1 000 metrojn longa, 3 metrojn larĝa kaj 1 metron profunda!

www.sanakvo.org

Periodikum Ĉeského
esperantského svazu - 43. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice, vhirsx@email.cz, tel.
517 332 339

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2012

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 43-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 10 eŭroj, ekster Eŭropo
13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero:
15.11.2012

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

La publiko dum la solena inaŭguro de la OSIEK-konferenco




Wera kaj Detlev Blanke, Christian Darbellay



Mantha Christou kaj Maria Butan



Jindřiška Drahotová kun junaj esperantistoj



Gerrit Berveling



Françoise kaj Eric Laubacher



Toon Witkam (meze)

fotis Květuše Korbářová, Svitavský deník

Teatraĵo Terura sonĝo laŭ R.U.R. de Karel Čapek



La spektejo estis plenplena



Malfeliĉa Alquist



Karel Čapek rakontas



Roboto Radius koleras



Gerobotoj Primus kaj Helena kiel novaj
Adamo kaj Eva

fotis Květuše Korbářová, Svitavský deník

La teatraĵon plenumis studenta teatro DOMA en Svitavy